

INFANA UNIVERSITATO

En Esperanto-kursoj la kursgvidantoj uzas diversajn instrumentojn por lernigi la lingvon kaj krei novajn esperantistojn. Eksterkurse funkcias la natura metodo: naski esperantistojn, esperantigi la infanojn denaske. Kaj partoprenigi ilin en la E-movada vivo, ekzemple tiel kiel en REF (Renkontiĝo de Esperanto-familioj), IIK (Internacia Infana Kongreseto dum UK), Festa Semajno aŭguste en la Kastelo Grezijono, eble ankoraŭ kelkloke. Kaj daŭre eduki ilin per Esperanto kaj pri Eo-kulturo tra la tuta infanaĝo.



En la 90-aj jaroj de la pasinta jarcento ILEI havis dum siaj konferencoj ILEI-gimnazion kun amuzaj lecionoj el diversaj fakoj por lernej-aĝaj esperantistoj, sed tio jam longe ne ripetiĝas. Tamen ĉe la ĉefevento de ILEI foj-foje gastas esperantistoj de infanĝardena aŭ lerneja aĝo. Ĉarma estis la ĉeesto de la 3-jara Elvira kaj la 8-jara Matensuno kun ankoraŭ kelkaj lernejoj en Oostende, 2015. La ĉinaj geknaboj Matensuno kaj Suno kun 4 samaĝuloj el Rumanio sopiris en Nyíregyháza, 2016, programerojn adaptitajn al iliaj aĝo kaj emoj. Ne nur amuzajn lecionojn el diversaj lernejprogramaj fakoj, sed ion pli ampleksan, pli varian por amuziĝi kaj kune lernante ĝui la vivon en Eo-komunumo.

La Estraro de ILEI konsideras la eblecon de revivigo de ILEI-gimnazio. Aŭ de porinfana/porjunula programo daŭriganta la ILEI-gimnazian tradicion kun nova kvalito. Infana universitato povas esti la taŭga formo. La termino universitato ligiĝas al la supera nivelo de klerigado kaj profesia kapablo en ajnaj fakoj de la sciencoj kaj artoj. En iuj landoj ekzistis kaj plu ekzistas Popolaj kaj Laboristaj universitatoj kun gamo da instruaj kaj kulturaj aktivajoj por klerigado kaj profesia lertigado en diversaj kampoj sur la niveloj baz-, mez- kaj altlerneja. Infana universitato en Esperantujo simile povas kovri vastan gamon da edukaj, klerigaj, kultur-artaj, sportaj, ludaj kaj vartaj bezonoj de la infanaĝa E-publiko.

Internacia Infana Kongreseto (IIK) kaj Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj (REF) plenumas tiun funkcion en limigita tempo de 7-10 tagoj malsammaniere. IIK grupigas Eo-infanojn en aparta loko proksime de UK, lasante al la gepatroj liberan tempon por ĝui la kapturne abundan kongresan

programon. En REF male, la gepatroj kaj infanoj pasigas la tempon kune kreante kaj ĝuante la eduk-ludan programon en sia eta kaj provizora Esperantujo. Infana universitato dum la kongreso de ILEI povas ebligi ambaŭ: kaj kunestadon de la gepatroj kun la infanoj, kaj tempodisponon por partopreno en elektitaj neinfanaj programeroj. Kaj ĝi povas akcepti ankaŭ instruistojn kun grupoj de infanaĝaj Eo-kursanoj sen aŭ kun la gepatroj aŭ parencoj. La gepatroj kaj infangrupgvidantoj povas solidare dividi la taskojn de prizorgo kaj programa gvidado de la infanoj laŭ interkonsentita tempoplano. Dum unuj deĵoras kun la infanoj kaj gvidas ilin tra la kongresa tempospaco, la aliaj ĝuas la kongresan programon, kaj poste alterne ŝanĝas la rolojn.

Alia grava funkcio de la Infana Universitato povas esti praktikejo por instrutrejntoj en la tradicia ILEI-kongresa instrutreja seminario, por iliaj provlecionoj kaj konatiĝo kun labormanieroj de spertaj E-instruistoj.

La ĉina Eo-instruistino SHI Xueqin – Neĝeta jam certigis la unuan grupon de infanuniversitatanoj en Busano ĉi-jare. Ŝiaj 14 infanaj Eo-kursanoj kaj deko da iliaj parencoj aliĝis al la Kongreso fine de decembro. La infanoj preparas kaj prezentos sian kontribuon al la kongresa programo. Ili meritas apartajn prizorgon kaj porinfanan kongresfadenon, kian provizos la Infana Universitato por ili kaj, esperinde, pliaj Eo-infanoj el diversaj landoj.

Radojica PETROVIĆ